

Joseph Freiherr von Eichendorff,

La mateno

tradukita de Manfred Retzlaff

La unua sunradi'
Flugas tra la valo ĉi,
Eksusuras la arbaro
Kaj ekflugas la birdaro.

Kaj pro ĝoj' eksaltas la
Homo kaj ekkrias: Ja
Same min kantad' flugigas,
De la ter' ĝi min malligas.

Eksteren hom'! Vi vidos ja:
Se io nokte premis vin,
Forigos ĝi! Facile la
Mateno rebonigos ĝin.

*Traduko de la Germana poemo "Der Morgen" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-560-1132 (2014-04-23 17:24:27)